

ĈU LA FAKLINGVO RAJTAS ALPRENI NOVAJN VORTOJN?

Informo de la TERMINOLOGIA CENTRO (Terminologia Sekcio de ISAE kaj Akademia Sekcio por Teknikaj Vortaroj)

Por la *komunlingvo* en Esperanto validas la principo de vort-ekonomio, por konservi la simplecon kaj facillerneblon de la Internacia Lingvo.

Specialaj direktivoj pri la vortfarado necesas por la *faklingvo*. Ĉi tie estas unuaranga la principo de klareco kaj unusenceco, alivorte: la teknika-sciencia lingvo nepre bezonas neologismojn alprenitajn el la internacia kutimo. Ne sufiĉas la malmultaj radikoj de la komunlingvo por precizigi la specialigitajn nociojn.

El tio rezultas la demando, ĉu aŭtoro rajtas eltrovi neologismon pri scienca nocio, por kiu en E-o ankoraŭ ne ekzistas vorto nocie samvalora. Inter la esperantistoj-fakuloj oni ne malofte renkontas dubojn, en kiu amplekso estas permesate, uzi la eblon alpreni neologismon, kiun donas al ni la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko.

La scienco devas esprimi la ideojn sen iu dubo; en ĉiuj kulturlingvoj la scienco havas propran esprimmanieron, proprajn - nur poparte internaciajn - vortojn kaj terminojn. Pro tio la internaciaj fakorganizaĵoj, kiuj laboras laŭ la direktivoj de FÉDÉRATION INTERNATIONALE DE DOCUMENTATION (FID) kaj INTERNATIONAL STANDARDS ORGANIZATION (ISO), komencis internacie normigi, nome unue la nociojn, due la terminojn. Esperantisto-fakulo do ne rajtas arbitre alpreni fakvorton el iu ajn nacilingvo, sed nepre devas konsulti jam ekzistantan plurlingvan (aŭ, se tia ankoraŭ ne ekzistas, unulingvan) difinvortaron eldonitan de la tiurilata internacia fakorganizaĵo aŭ rekomenditan de *Unesko*. Tiuj fakvortaroj jam ekzistantaj kaj rekomenditaj estas troveblaj en jenaj publikigaĵoj de *Unesko*:

1. „*Bibliography of Interlingual Scientific and Technical Dictionaries*” by Ph.D. J. E. Holstrom,
2. „*Bibliography of monolingual scientific and technical glossaries*” by Techn. Dr. Eugen Wüster, Vol. I: *National Standards, 1955*, Vol. II: *Miscellaneous sources, 1959*.

Tiuj indeksoj de fakvortaroj estas kurante daŭrigataj en la monata bulteno de UNESKO „*Bulletin Mensuel*”, kiu regule estas sendata al TS de ISAE.

Bedaŭrinde nun ne eblas al la *Terminologia Centro*, elutiligi tiujn valorajn fontojn; por plenumi tiun taskon oni bezonus plurpersonan kunlaborantaron. Sed en posta fazo de la plivastigo de nia Internacia Lingvo en scienco kaj tekniko, kiam ni disponos kompetentulojn en ĉiuj kampoj, pliampleksa *Terminologia Centro Esperantista* kapablos utiligi kaj publikigi al la esperantistoj-fakuloj la tutan materialon de la menciitaj indeksoj. Nuntempe ankoraŭ ne ĉiuj fakoj estas pritrakitaj en

difinvortaroj rekomenditaj de *Unesko*. Intertempe niaj aŭtoroj de fakliteraturo kaj fakvortaroj estas devigataj, zorge elekti la plej internacian formon de fakvorto el la nacilingvoj. Do niaj kompetentuloj pri fiziko senskrupule rajtis alpreni *flukso*'n anstataŭ la komunlingvan *fluo*'n, en la senco de *magnetisma fluo en magneta cirkvito*. La decido pri bezono kaj neceso de neologismo ĉiam kuŝas ĉe la fakulo, ne ĉe la lingvisto. La fakulo konstatis ke la komunlingva vorto *fluo* ne sufiĉas por karakterizi la nocion, kaj li elektis la plej internacian vorton *flukso* por precizigi ĝin. Kiel „fakulo” en la menciita senco kompreneble validas nur tia sciencisto, kiu plene regas la nociaron de sia fako kaj tial scipovas doni ekzaktajn difinojn ĝeneralajn kaj ĉiam validajn. La lingvisto (ĉi-okaze plej eble lingva komitato de la *Akademio de E-o*) kontrolu sole la eksteran formon de la termino.

En la nuna fazo de la evoluo kaj praktikado de la fakterminologio en Esperanto ja estas malfacila tasko, verki ĉion ampleksantan vulgariĝan verkon, kiel celas esti la PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV), kiu nun estas en preparo. Ties teknika-sciencia parto ja devos esti tute fidinda bazo, alfabete ordigita laŭ la komencolitero de la radikoj, taŭga por aligi poste specialan vortaron laŭsisteman pri ĉiu laŭvola fako. Tamen la aperigo de tiu tute reviziita eldono de la famkonata P.V. ne toleras pluan malfruiĝon. Tial la uzanto indulgu, se li trovos ke iu fako en la vortaro estas pritraktita ne sufiĉe detale; pli perfekta homogeneco estos atingebla nur en posta fazo, kiam ekzistos en Esperantujo terminologiaj laborrondoj pri ĉiuj fakoj. Ĉi-okaze PIV instrukcios per ekzemploj, kiel oni laŭsence forigu la malplenaĵojn. La redaktantoj faros laŭ sia eblo por baldaŭ aperigi PIV'n; por atingi unuformecon de la teknika lingvo, ni rekomendas al ĉiuj kiuj preparas fakvortaron, unue atendi la aperon de PIV, antaŭ ol aperigi ĝin. R. H.

RUSA HISTORIISTO KAJ HUNGARA HIDRAŬLIKISTO DEZIRAS KONTAKTON KUN SAMFAKULOJ

Stjepan Konstantinoviĉ Ĥvorostin, docento de rusa historio en Leningrado (kaj ano de Leningrada Domo de sciencistoj, kie laboras tre vigla esperanto-sekcio) esprimis ardan deziron interŝanĝi kun aliaj fakuloj informojn pri temoj el rusa historio, precipe pri periodo antaŭ la Oktobra revolucio (pri kiu periodo li estas specialisto). Li povas sendi al interesiĝantoj informojn pri novaj libroj kaj artikoloj aperigitaj en rusa lingvo, pri disputoj en historiistaj gazetoj pri problemoj de rusa historio, pri rusaj historiaj monumentoj, muzeoj ktp. Lia adreso estas: S. K. Ĥvorostin, str. Sojuza Svjazi 2o, kv. 24, Leningrad-Centro 1, USSR.

Ottó H a s z p r a, nova esperantisto kaj diplomita inĝeniero hidraŭlika, laboranta en *Vízgazdálkodási Tudományos Kutató Intézet* (Sciencia Esplorinstituto de Akvomastrumado), Rákóczi-ut 41, Budapest VIII, serĉas kontakton kun alilandaj samfakuloj.